

### **KOMENCIĜAS TRE BALDAŬ LA HISPANA KONGRESO**

Rapidu! La 82-a Hispana Kongreso de Esperanto komenciĝos jam la 5-an de septembro. De tiu ĵaŭdo kaj ĝis la dimanĉo 8-a disvolviĝos en la urbo Cheste (apud Valencio) la granda festo de la esperantistoj de Hispanio kaj aliaj vizitantoj.

La oficiala inaŭguro okazos la vendredon 6-an. Tiun saman tagon, vespere, la urbestro de Cheste akceptos la kongresanojn por oficiala bonveno, kun omaĝo al veteranaj esperantistoj de la loka grupo, kaj invito al kunmanĝado.

Memoru ke eblas gastigi en la sidejo de la kongreso mem, nome la monumenta Eduka Komplekso (iam nomata "Labora Universitato"), kun tre favoraj prezoj. Oni ne povas certigi la disponeblon pri loĝado por tiuj alvenantaj en la lasta momento, do bv. tuj kontakti kun la organizantoj se vi ankoraŭ ne rezervis.

En la kongresejo ankaŭ eblas manĝi dum la tuta daŭro de la kongreso. Legu la detalojn (kaj eventuale rezervu) en la retejo: <https://kongreso.esperanto.es/manghado.html>.

Krome, tiuj kiuj povos resti pli longe povos konatiĝi kun Valencio kaj ties ĉirkaŭaĵoj en serio da postaj ekskursoj.

Vi povas aliĝi al la Kongreso kaj koni aliajn informojn en la oficiala retejo <https://kongreso.esperanto.es>. Multaj aliaj detaloj estas aktualigataj en la paĝo de EventaServo <https://eventaservo.org/e/e977a3>. Krome, vi povas aliri la kanalon de Telegram ĉe la adreso: <https://t.me/HispanaEsperantoKongreso>, por koni la lastajn novaĵojn.



### **MADRIDANOJ EN SOMERAJ KONGRESOJ**

En tiu ĉi pasinta aŭgusto disvolviĝis pluraj internaciaj kongresoj de Esperanto, en kiuj partoprenis kaj diversmaniere rolis madridanoj.

Komence de aŭgusto okazis la Universala Kongreso unufoje en Afriko. Laŭ ĉiuj atestoj ĝi rezultis en granda sukceso, kun alta partopreno de afrikaj esperantistoj. Dum la unua tago prezentiĝis la diversaj asocioj de la movado, pere de la Movada Foiro. Hispanan Esperanto-Federacion reprezentis niaj samurbaranoj Elsa, Pedro kaj Paula (vidu foton)



Krome, kiel tradicie, dum la kongreso okazis la anonco de la rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA, kies juĝkomisiono prezidas Miguel Fernández. Vi povas spekti lian anoncon de la rezultoj en jutubo ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=YFljpFqGNMg>, kaj liajn gratulvortojn ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=CpdYnZvAFOk>.

La kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazis pli proksime, en Porto (Portugalia). Dum ĝi Félix prelegis pri la surstrata movado en Madrido 13 jarojn post la okazaĵoj de la 15-M.

Kaj dum la 80-a Internacia Junulara Kongreso en Litovio, David instruis junajn kongresanojn kiel danci ŝotiŝon!

## **BALDAŬ MALFERMIĜAS DENOVE LA KURSOJ EN UNED**

Denove ĉijare okazos kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), en du niveloj A2 kaj B1. Ĝia Centro pri Lingvoj anoncis la baldaŭan malfermon de la enskribo por la venonta akademias jaro, la 5an de septembro. Ĝi finiĝas la 22an de oktobro.

Ni memorigas ke la anoj de la Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribo. Krome, Madrida-Esperanto Liceo planas stipendii lernontojn; interesitoj kontaktu kun la adreso: [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es).

Vidu ĉiujn informojn ĉe: <https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html>.

## **VIZITIS KAJ VIZITOS NIN**

Kiel ni antaŭanoncis, pluraj esperantistoj el diversaj landoj vizitis Madridon en julio kaj aŭgusto. En la foto aperas Alejandro kun japana paro kiun li ĉiĉeronis.

La dimanĉon, 1-an de septembro, vizitas nin la brazila samideano Julio Calegari, nun loĝanta en Dubajo. Ni planas rendevui kun li en la sidejo, je la 18,00 horo, kaj poste kuntrinki kaj kunmanĝi.

Dum la unua duono de septembro vizitos nin la kolombia esperantisto Iván Santacruz. Ni informos en la kutimaj forumoj (vidu sube la adresojn) pri la planoj por renkontiĝo en la sidejo kaj ekstere.



## **SEPTEMBRAJ RENKONTIĜOJ**

Ekde la 2-a de septembro ni rekomencas la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo. Oni planas organizi iajn aktivadojn, por la Tago de Paco kaj la Eŭropa Tago de Lingvoj, sed ni ankoraŭ ne fiksis detalojn. Bv atenti la forumojn.

La sabata renkontiĝo okazos ne la unuan semajnfinojn, pro la okazigo de la Hispana Kongreso en Cheste, sed la 14-an de septembro, je la 18,30 horo, en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, strato Idioma Esperanto, num. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2).

## **PLIAJ INFORMOJ KAJ KONTAKTOJ**

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [https://groups.google.com/g/esperanto\\_madrid/](https://groups.google.com/g/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: <https://twitter.com/LiceoMadrida>.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo <https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g>

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.



madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

Redaktas Toño del Barrio

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)

